

Leterkesto, 1.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991 marto 28.

<http://www.esperanto-gacond.ch/tac/91-010-A-1-Claude-kaj-Andree-GACOND-Leterkesto-1.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Semajnon post semajno alvenas el ĉiuj partoj de la mondo afablaj vortoj de niaj geaŭdantoj. En januaro ni esprimis niajn bondezirojn por la nova jaro en leterkesto, kiu venigis nin al la litero K, kaj hodiaŭ ni daŭrigas nian salutadon laŭ la alfabeto ordo de la familiaj nomoj ekde tiu ĉi litero.

A.- Kelkfoje ni malfacile divenas, el ambaŭ nomoj ricevitaĵ, kiu estas la familia kaj kiu estas la individua. Tial ni faras la proponon, ke la korespondantoj substreku sian familian nomon. Kaj ankaŭ ni petas, ke ĝenerale ĉiuj skribu kiel eble plej legeble. Ni ne povas respondi al kelkaj skribintoj, ĉar tute simple ni ne kapablas deĉifri la familian nomon aŭ la adreson. Tre gravan problemon ni renkontas por la prononco de la nomoj familiaj kaj urbaj. Se naskiĝus la bona kutimo interkrampe indiki per esperantaj literoj kiel eble plej najbaran prononcon laŭ la esperanta fonetiko, niaj salutoj estus pli kompreneblaj al multaj. Ni proponas, ke ekde tiu ĉi jaro ĉiuj skribantoj donu interkrampe per esperanto-literoj proksimuman prononcon de la nacilingvaj vortoj, do ankaŭ de siaj nomoj kaj loĝloko.

Cl.- De letero de KAMRAN Rashid en Lahore, Pakistano ni citas la tuton: Mi ofte aŭdas viajn elsendojn de Svisa Radio Internacia, kvankam la aŭdebleco ne estas tre bona ĉi tie. Aŭdante vian elsendon de la 18-a de aŭgusto, mi komprenis ke vi ekirigas informojn pri la verketo de Edmond Privat al interesatoj. Vi prezentis kelkajn tezojn de lia verko kiuj interesis min. Mi volas legi lian verketon. Mi lernis esperanton de nedika libro kelkajn monatojn antaŭe. Mi ne konas iun adreson en mia lando de kie mi povas aĉeti iun esperantaĵon: Se vi havas adreson de iu Esperanta Asocio en Pakistano, kaj, se vi sendos al mi informojn pri la verketo de Edmond Privat, mi estos dankanta al vi.

Kara pakistana samideano KAMRAN Rashid ni perkoresponde helpas al vi. Kaj eble kelkaj aŭskultantoj ŝatos ankaŭ helpi al vi, ke vi akiru kelkajn librojn. Tiam tra la kanalo de la esperanto-fako de Svisa Radio Internacia ni volonte transdonos al ili vian adreson.

A.- Svetislav KANAĈKI en Mt. Waverley apud Melbourne, Aŭstralio skribis: Mi ne plu skribas tiel ofte kiel mi praktikis fari, sed mi regule aŭskultas vin en aer-ondoj, kaj se estas bona ricevo mi sonbendigas kaj ludas viajn voĉojn en nia radio-programo.

Cl.- Ni deziras plenan sukceson al la esperanto-programo ĉe radio Melbourne, kiun ĝuste iniciatis kaj vigligas Svetislav KANAĈKI. Ĝi daŭras po duonhoron semajne, kaj ni ĝojas, se kelkfoje niaj paroladoj povas tiel reaŭdiĝi en Aŭstralio.

A.- Kaj nun ni rigardu al Bulgario, kie sinjorino Dimova KALINCA en Jambol, ŝatus, ke ni parolu ĉiutage en esperanto ĉe Svisa Radio Internacia, kiun ŝi facile aŭskultas.

Cl.- Kiam la esperantoparolantoj estos pli multnombraj, eble tio foje okazos. Ni nun kapablu defendi nian pozicion vidalvide de pli enspezigaj kaj prestiĝaj lingvoj. Kaj por tiu defendo tre utilas la regula ricevo fare de radiostacioj de perleteraj aŭ perpoŝtkartaj vivsignoj de la geaŭdantoj.

A.- Norbert KARBE en Pirna, Germanio, skribis: Parolinte kun Richard HOWARD, kiu nun laboras en Usti nad Labem en Ĉeĥoslovakio, mi eksciis, ke vi interesiĝus pri bildkartoj kun esperanto-teksto. Kaj Norbert KARBE sendis al ni poŝtkarton kun la indiko: 1908 parolis D-ro Zamenhof en Wehlen. Tiajn kartojn ni konservas en la esperanto-arkivejo [CDELI](#), tio estas Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, kiu troviĝas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Dum la pasintaj semajnoj parto de la kolekto de CDELI translokiĝis al pli vasta movbretaro. La vizitantoj estas ĉiam impresitaj de la graveco de la kolektoj jam amasigitaj kaj poste partoprenas al ilia pliriĉigo per la alsendo de libroj, revuoj, cirkuleroj, fotoj, leterkolektoj, ktp. Ĉio estas bonvena. La lundojn matene grupo da helpemuloj okupiĝas pri la ordigado de la ricevita materialo kaj du bibliotekistoj havas en sia ĉiusemajna deĵorado po kelkajn horojn je la dispono de CDELI por la katalogado de la libroj. Nenio perdiĝas. Kiam alvenas duoblaĵoj, tio estas libroj, revuoj aŭ aliaj dokumentoj, kiujn CDELI jam posedas, tiam tiu materialo konserviĝas en interŝanĝejo, je la ĝojo de aliaj dokumentejoj kaj de kolektantoj. Do per interŝanĝo aŭ vendo de troaj dokumentoj CDELI povas akiri pecojn, kiuj mankas en la propra kolekto.

Cl.- Jaroslav KARHAN en Olomouc, Ĉeĥoslovakio skribis: Alproksimiĝas la lasta deklaro de la 2-a miljaro, kiu devus esti dediĉita al harmoniigado de la tuthomara vivo kaj precipe esperantistoj devus - helpe de moderna aplikado de la zamenhofa homarana idearo - kontribui al tio.

A.- Dankon al Karl-Heinz KERSTING en Essen, Germanio, kiu sendis du mesaĝojn kaj al Akseli KIRSILA en Helsinko, Finnlando, kiu skribis: "Mi kutimas aŭdi vian elsendon per radio-ricevilo kaj konstatas, ke via programo kaj en ĝi la prononcado estas bona. Ankaŭ aŭdebleco estas relative bona. Mi ŝatas aŭdi paroladon pri aktualaj temoj, sed ne pri muziko."

Cl.- Jozefo KISS en Hungario, relegis la romanon "Pro Iŝtar" de Luyken post la prelego de nia kunlaboranto Pascal Dubourg.

A.- Saluton al Gertraud kaj Gerhard KNORR en Gera, Germanio kaj al J. KONDOR, kiu sendis mesaĝon el sia devena urbo Szombathely, Hungario.

Cl.- Amikajn vortojn al Jan KLOCEK en Wloclawek, Pollando, al Robert KOEHLER en Vestavia Hills, Usono, al Anton KRONSHAGE en Schweim, Germanio kaj al Karel KOPECKY en Trebechovice, Ĉeĥoslovakio, kiu skribis: Ni ĉiam kaptas vin en bona kvalito ĵaŭde kaj sabate... Ankaŭ per la ekstereŭropaj elsendoj mi vin kaptas kiel ripetadon... ankaŭ en bona kvalito. Ĉar viaj programoj estas ĉiam tre interesaj mi ne povas perdi eĉ unu el ili. Ĉiam la aŭskultado estas por ni vera ĝuo. Dankon! Iam ni ankaŭ vian programon surbendigas por niaj amikoj... Ni estis kontentaj, ke ni denove povas vojaĝi sen problemoj eksterlanden. En nia socio komenciĝas grandaj ŝanĝoj - privatigoj de entreprenoj, fondiĝas privataj gastejoj, servoj ktp. Foriras soveta armeanoj kaj nia lando povas libere elspiri. Ĉio ŝajnas feliĉe, kvankam ni bone scias, ke ankaŭ venos monatoj kun ekonomia krizo, monatoj de konstruo de nia tuta ŝtata ekonomio. Sed ni ĉiuj kredas kaj laboras por nova vivo.

A.- Ankaŭ salutis el Ĉeĥoslovakio K. KRAFT en Borotice kaj Jiri LAUBE en Roudnice, Ĉeĥoslovakio, kiu sendis 6 mesaĝojn, el kiuj ni citas kelkajn frazojn: Mi salutas vin ĉiujn kaj gratulas al viaj elstaraj programoj... Mi aŭdis ege interesan programon pri Edmond Privat kaj lia, se mi povas diri, mondkoncepto kaj ĝenerala sinteno. Tiaj programoj estas vere necesaj. Mi subtenas ĉiujn opiniojn, kiuj gvidas aŭ instigas al morala, justa agado, al pacama konduto. Tia estis la koncepto de Edmond Privat, kiun mi ege admiras kaj alte taksas. Ni, en nia lando, travivis en la nun finiĝanta jarcento multajn ŝanĝojn. Ĉiuj estis oficiale motivitaj per justeco,

toleremo kaj bonstato, sed fine montriĝis, ke egoismo de kelkaj homoj aŭ grupoj estis la vera motivo por ili. Ni scias, ke neniuj donacoj plibonigos nian situacion, sed la senkompatema alpaŝo de kelkaj financaj rondoj estas fortimiga. La lavangforma enkondukado de la angla tute similas, aŭ eĉ superas la similan enkondukadon de la germana dum la hitlerisma okupacio, kaj poste de la rusa sub komunismo.

Cl.- Pluraj ĉeĥoslovakoj same raportis pri la nuna amasinstruado de la angla lingvo en ilia lando.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND remalfermos sian leterkeston por saluti skribintojn. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*